# --AKTUALE--

**plej freshaj informoj pri la Tutmonda Junulara Esperanto-Movado**

al la chefa pagho | sendu novajhojn | TA-teamo | aligho al la listo

## TA-arkivo

- prova numero (27 Novembro, 2001)
- prova numero (19 Februaro, 2001)
- numero 2 (12 Marto)

## lastaj novajhoj:

Sur la retpagho <http:// 158.169.131.60/leonardo_psd /> estas kreata datumbazo en kiun oni povas meti informojn pri siaj projektoj por trovi partnero(j)n, serchi partnero(j)n au manifesti sian intereson esti partnero en specifaj agadkampoj.

Ankau por tiuj, kiuj interesighas pri projektoj estas konsilinda rigardi jenajn paghojn de la GhD Edukado, en kiu oni povas havigi al si ideojn kaj perspektivojn por ontaj projektoj.

<http://eur opa.eu.int/comm/ education/ index_en.html > (angla versio)

<http://europa ..eu.int/comm/ education/ind ex_de.html> (germana versio)

<http://europa ..eu.int/comm/ education/ind ex_fr.html> (franca versio)

Plia informo: Jimmy Stryhn Meyer <Jimmy.Stryhn_Meyer **@curia.eu.int**>

## Teamo de TEJO-

## N-ro 1 (5 Marto, 2001)

1. LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO SERCHAS KUNLABORANTOJN

2. INTERESAJ ARANGHOJ POR AKTIVULOJ

3. TREJNAJ MANLIBROJ EN LA RETO

4. RETLIGOJ PRI EUROPA JARO DE LINGVOJ

5. PLI KAJ PLI DA LINGVAJ FESTIVALOJ

---

1. LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO SERCHAS KUNLABORANTOJN

La organizantoj de la venonta Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazonta en Strasburgo (Francio) de la 29a de julio ghis la 5a de augusto 2001) serchas kunlaborantojn por la programo (dancoj, E-kursoj, teatrumado, prelegoj, pentrajhoj, kuirado, aktivajhoj por infanoj...). La kunlaborantoj povos ricevi rabaton. Sendu viajn proponojn al Celin' <celinbernar@free.fr>.

Retpagho de IJK: <http://purl.org/net/ijk2001> ..

---

2. INTERESAJ ARANGHOJ POR AKTIVULOJ

- Europa Junulara Centro, Budapeshto, 12-24.06.2001: trejnkurso de la Konsilio de Europo "Trejnado por Trejnistoj". Limdato: 01.04.2001.

Informoj (angle kaj france): <http://www.coe.fr/youth/english/EYC/ Programme2001/TCs2001/TCs2001calendar.htm>

- Prago, 11-15.05.2001: Students' Forum 2000 - Conference 2001: "Education for a New Global Culture of Human Rights?". Limdato: 25.03.2001

Por alighi au pluinformighi, urghe kontaktu la TEJO-oficejon:

<tejo-oficejo@esperanto.org>.

Alighoj preter TEJO plej ofte ne akceptighas!

---

3. TREJNAJ MANLIBROJ EN LA RETO

## Pri TEJO-aktuale

TEJO-aktuale estas senpaga chiusemajna retrevuo de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Kompare al aliaj E-retservoj TA:

- publikigas mallongajn informojn kaj strebas proviziigi adresojn de retpaghoj (au kontaktpersonoj) kie troveblas pli da materialo.
- Chiusemajne ghi dissendas nur kelkajn, elektitajn novajhojn, interesajn por la junulara E-movado.
- Ghi aboneblas senpage kaj ghia tuta enhavo troveblas che <ht tp://www.esperanto.org/ te jo/publikajhoj/aktuale/ ta.html>
- oni povas libere sendi novajhojn koncerne junularan E-vivon lau la adreso: <tejo-aktuale-red @esperanto.org >

## Aligho al la revuo

Chi tie vi povas senpage aboni TEJO-aktuale-n. Skribu vian retadreson kaj klaku sur "Abonu". Ene de semajno vi ricevos vian unuan numeron!

via.adreso@papago.net

Abonu

Klaku chi tie por legi kiel malaboni au se la supra

## aktuale

Krom kunlaborantoj, kiuj provizigas la revuon per novajxoj, pri cxiusemajna apero de TEJO-aktuale respondecas:

Katya A. Ignatyeva (kunordiganto) <katido@mac.com>

Giuseppe Castelli (chefredaktoro) <giuseppe@agbms.ch>

Emilia Pruszynska (kontaktoj kun kunlaborantoj) <emiliad@wp.pl>

---

## Kunlaborantoj

TEJO-aktuale estas revuo de junaj esperantistoj klaj por junaj esperantistoj. Ghia aktualeco dependas de ghustatempa informado pri diversspecaj okazintajhoj flanke de Landaj Sekcioj de TEJO kaj de unuopaj junaj esperantistoj. TEJO-aktuale bezonegas vian helpon! Ighu kunlaboranto de la revuo kaj sendu al ni chiajn informojn pri esperantaj junularaj okazajhoj! Por sendi viajn novajhojn, bonvolu skribi al:

<tejo-aktuale-red@esperanto. org>

Lau la sama adreso estas ankau bonvenaj viaj rimarkoj kaj proponoj pri la enhavo de TA kaj pri ghia aspekto. Antaudankon, kaj bonan legadon!

Haveblas en la reto, en .PDF-formato, la trejnaj manlibroj de Konsilio de Europo kaj Europa Unio: "Organisational Management", "Methodology in Language Learning", "Project Management - For trainers, youth workers running projects" kaj "Intercultural Learning - For trainers and other youth dealing with intercultural issues". La adreso estas:

<http://www.coe.fr/Youth/english/Partnership/t-kits/frametkits.htm>

---

4. RETLIGOJ PRI EUROPA JARO DE LINGVOJ

- Konsilio de Europo, tre informplena retejo:

<http://culture.coe.int/ael20 01eyl/> (angle)

<http://culture.coe ..fr/AEL2001EYL/ael0001.htm> (france)

- Europa Unio: <http://www.eurolang2001.org/&g; t; (11-lingve)

- Flugfolio "Lingvoj malfermas pordojn" diverslingve:

<http://www.esperanto.se /pdf/ijl2001.pdf>

- Ligoj al multaj pliaj paghoj:

<http:/ /groups.yahoo.com/group/Jaro-de-lingvoj-2001/links>

---

5. PLI KAJ PLI DA LINGVAJ FESTIVALOJ

Ankau pro la instigo de la Europa Jaro de Lingvoj, intensighas la (kun)organizado de Lingvaj Festivaloj fare de esperantistoj. Ili planatas almenau en Ivanovo kaj Cheboksari (Ruslando), Berdjansko (Ukrainio), Vasteras (Svedio), Tuluzo kaj Truo (Francio) kaj en Valencio (Venezuelo).

Por pliaj informoj (kaj eventuala enskribigho en retlisto tejo-lf) kontaktu la TEJO-komisiiton pri Lingvaj Festivaloj Ekaterina Evlampieva

<kat-jevl@cbx.ru>;

retejo: <http://www.esperanto.org/tejo/ lf>.

butono ne funkcias che vi. Au sendu mesaghon al la administranto de la listo je: <tejo-aktuale-red2 @esperanto.org>

---